

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

IPR

Organo de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Jarkolekto 11

N-ro 3, 1981

Edistudio, Pizo, Italujo

Internacia Pedagogia Revuo - n-ro 3, 1981

fotokompostado: Edistudio, C.P. 213, I-56100, Pisa, Italujo, Tf. + 39/50/48670
presado: Offset Vallerini, Pisa, Tf. + 39/50/48670

Enhavo

Rimarkigoj kaj indikoj

Libereco aŭ aŭtoritato

Raporto

Kelkaj interesaĵoj el la 15a Konferenco de ILEI

Staturo kaj Ĝenerala Regularo de ILEI

Anstataŭ recenzi...

Didaktikaj ludoj

IPR informas pri la 16a konferenco de ILEI

—
François Lo Jacomo
Nino Pala
H. Sonnabend
—
—
Far. Pdensky
H. Sonnabend

Rimarkigoj kaj indikoj

1. «La sableroj formantaj la plaĝon ĉe la mar' kaj la doktoroj estas sennombraj», diris al mi bona amiko, kiu mem kvarfoje — ĉiam sukcese — doktoriĝis. Eble la universitataj gradoj inflacias — sed nombro tiujn, kiuj doktoriĝis per/en Esperanto!

Mi nur konas du sinjorojn: kaj unu inter ili estas *François Lo Jacomo*. Estis la 29-a de Junio 1981! Dum tri horoj li defendis sian disertacion pri la temo «Libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto».

IPR kaj ĝia redaktoro kore gratulas. Estas esence nur du kolonoj sur kiuj Esperanto estas sekure apagata: scienco kaj instruado de Esperanto.

Por Esperanto mi deziras iom pli da «plaĝa sablo».

Volonte mi disponigas paĝojn en IPR, sciante, ke la resumo trovos vian interesiĝon: jen estis defendata Esperanto kiel vivanta lingvo eĉ la resumo jam povas helpi nin.

2. Kiu jam iel provis enkonduki Esperanton en sian lernejon kaj fine sukcesis kaj nun regule instruas, tiu konas la «ŝtonan» vojon similan sur kiu trenis la pioniroj siajn ĉarojn en la Novan Mondon, konata nun sub la nomo Ameriko. Kion nur unu homo kapablas akiri, demonstras la kuraĝa agado de kolego Pala. Sed li ankaŭ tuŝas seriozan problemon: la izolecon de gekolegoj instruantaj Esperanton. Tial: gekolegoj, kiuj regule instruas la lingvon en la lernejo, bonvolu turni sin al la redaktoro de IPR. Li proponos vojon por plibonigi la situacion!

3. «Kelkaj pensoj pri la instruado», skribis kolegino Tavĉar, kaj ŝi bindis belan bukendon. Ŝia averto: Esperanto ne dronu en la marĉon de ĉiutaga instruado. Kiel ŝi bone priskribas!

Same tre interese riĉigas nian instruadon kolego Polensky. Li iom sistemigas la ludon kaj ĉiam prezentas specimenojn. Eble li prezentu baldaŭ pluajn?

4. Kolego Berveling probable ne konas la etoson de IPR, tiam li ne bezonus «supozi». IPR estas malferma por la tuta spektro de la pedagogio. Jen koordinatoj!

5. Gödöllő — la 15-a konferenco: ne nur pro la 161 partoprenantoj sed same pro ĝia kvalito, kies meriton ni rekonu al niaj hungaraj geamikoj, ĝi estis tre sukcesa: bonvolu ankaŭ turni vian atenton al nia ĉi-jara rezolucio: ĝi jam nun celas al nia kontribuo al la 100-jara datreveno de la eniro de Esperanto en la mondon. Mi bezonas ĝian tradukon en multajn lingvojn. Jam la rezolucio estos sendata al gravaj instancoj de via lando. Kiu helpas?

6. Nova konferenco — la 16-a — realiĝos! Legu la informon kaj tuj uzu la aliĝilon! Antaŭ mi pendas la bildkarto pri nia konferencloko. Rekte de la hotelo oni vidas la Vezuvion.

7. La sekciestroj priatentu la inviton al la asembleo de ILEI. Ĝi estas publikigita nur en IPR — la Organo de nia Ligo.

8. Pliaj komentoj pri nia statuta projekto, ilin sendis kolego Hoekstra. Se vi havos aliajn amendojn bonvolu ilin rekte sendi al mi.

9. Ĉu vi konas Carmel Mallia? La poeta aspekto de Esperanto ne estu de ni nelektata. Estas spirita plezuro legi liajn poeziaĵojn.

SERIO ORIENTO-OKCIDENTO N. 16

Tiu pinto de la soneta arto, la sonetaro de Shakespeare, nun aperas en traduko de unu el niaj ĉefaj poetoj, William Auld. Ĉiam la sonetoj de Shakespeare prezentas kvazaŭ defion al la tradukanto. Iliaj delikate skulptitaj linioj, iliaj kadencoj kaj figuroj, iliaj aludo kaj eĥoj — ĉio ĉi malfacile transiras de lingvo al lingvo. Kvankam Shakespeare estis ido de sia epoko kaj sia kulturo, la voĉo, kiu parolas al ni el la sonetoj (tiu sola kaj simpla voĉo, kiu restas kiam la aktualaj aludoj, la hazardaĵo de la erao, la parolturnoj de la poezia tradicio, estas ĉiuj glositaj kaj enfakigitaj), estas la voĉo de ĉiu homo, kiu frontas la misteron de la memo. Neniu alia verko tiel pure prezentas al ni la psikajn kontraŭdirojn de la homa kondiĉo — ĉiam kaj ĉie kaj ĉiel. Jen la tereno de la homa menso, tiel kara sed tiel febla, sur kiu devas konstruiĝi la remparoj de la homeco. Ĉu ĝi kapablas ilin elteni?

H. Tonkin


mendu rekte ĉe

Edistudio

c.p. 213 I-56100 pisa
italujo — pĉk 12230561

328 paĝoj — A5 — lukse bindita — 40 nl.gld.

Rabato 33,3% por mendoj de almenaŭ 3 ekzempleroj • 10% por sendokostoj



Libereco aŭ aŭtoritato

en la evoluo de Esperanto

de François Lo Jacomo

Gvidita de: *André Martinet*, defendita en: *Sorbonne (Parizo)*, amfiteatro *Durkheim*, la: *29an de Junio 1981*, matene (*9a ĝis 12a*), antaŭ: *André Martinet (raportanto)*, *Frédéric François (prezidanto)*, *Henriette Walter*, *Michel Duc Goninaz (fakulo pri la temo)*; akceptita kun mencio "tre bone"

konsistas el kvin ĉapitroj (384 paĝoj entute), kun jena enhavo:

Enkonduko; Unua ĉapitro: Libereco aŭ aŭtoritato en lingva evoluo; Dua ĉapitro: Esperanto, vivanta lingvo [Esperanto kaj planlingvoj, La fonologio de Esperanto, La sintakso de Esperanto, La vorttrezoro de Esperanto]; Tria ĉapitro: Pliriĉiĝo, evoluo, (re)aktualigo, reformo [Pliriĉiĝo kaj evoluo, Eraro kaj evoluo, (Re)aktualigo, Reformo, Kiel oni traduku "un ordinateur" en Esperanto?, La seksa diskriminacio, La problemo "aliel", La konflikto *-ata/-ita*: tempoj aŭ aspektoj?, La akuzativo]; Kvara ĉapitro: La sinkronaj simptomoj de l' evoluo [Dinamiko, aŭ dinamika sinkronio?, La enketo, La principoj je balasto, Balasto kaj evoluo: la dinamiko de diskretaj unuoj, Priskriba vidpunkto kaj klariga vidpunkto: ĉu unu aŭ pluraj lingvistikoj?]; Kvina ĉapitro: Libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto; Konkludo; Esperantlingva resumo; Bibliografio; Enhavtabelo.

Tiun ĉi resumon oni rajtas represi, entute aŭ parte, kondiĉe, ke oni menciu la fonton: «*disertacio Lo Jacomo*», kaj se eble, ankaŭ la adreson: *François Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, F-75016 Paris, Francio, kaj ke oni sendu al la ĉi-supra adreso, senpage (por informo), almenaŭ unu specimennon de la publikaĵo (revuo), en kiu aperis la represo.*

Esperantlingva resumo.

Post preskaŭ cent jaroj da ekzistado de Esperanto, ĉu malsukcesa estas la bilanco? Kia ajn estus la respondo al tiu ĉi demando, ne tie troviĝas la kerno de tiu ĉi disertacio: Esperanto vivas, ĝi evoluas, kaj la pritraktata demando, libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto, signifas konkrete jenon: ĉu Esperanto funkcias same kiel la aliaj lingvoj? Ĉu pro aŭ malgraŭ la aparteco de Esperanto, ĝia evoluo si-

milas aŭ malsimilas al tiu de aliaj lingvoj? Kian starpunkton povas havi lingvisto fronte al tiu lingva evoluo?

La unua ĉapitro, tre mallonga, memorigas pri kelkaj tute ĝeneralaj demandoj koncerne la lingvan evoluon, sen proponi respondon al tiuj demandoj.

Poste, en la dua ĉapitro, venas priskribo de Esperanto kiel vivanta lingvo.

Laŭ interlingvistika vidpunkto, mi situigas Esperanton en la historio de planlingvoj, insistante pri la diferenco je celoj inter la diversaj proponitaj projektoj: al kia bezono je komunikado ili klopodas respondi?

La fonologio de Esperanto estas relative banala; mi rapide prezentas opoziciajn parojn por dediĉi iom pli da loko al la problemo: ĉu *c* estas unu fonemo [c] aŭ du [ts]? Jam en ĉi tiu paragrafo ekaperas la ideo, ke respondon al tia demando oni povas proponi ne absolute, sed relative al la celo, kiun oni planas atingi: se pli utilas, ke *c* estu ununura fonemo, tiam ĝi ja estas ununura fonemo.

Koncerne sintakson, mi konservas similan starpunkton multe insistante pri la diferenco inter *vorto* kaj *morfemo* (aŭ *vortelemanto*, franclingve *monème*), ĉar tian distingon mi nepre bezonas en la pluaj ĉapitroj; almenaŭ en Esperanto ĝi aspektas fundamenta. Al la klasika funkciismo de André Martinet, kiu forigis la koncepton *vorto* pro manko de taŭga difino, mi respondas, ke ne ĝia difino rajtigas terminon al ekzisto, sed la bezono, kiun oni havas je ĝi. Distingante vorton disde morfemo, oni ebligas distingon inter sintaksa informado kaj semant(ik)a informado, kiuj ne kondukas al sama segmentado: *post tagmezo* estas du vortoj, *post ludas* en tia grupo sintaksan rolon de prepozicio, dum *posttagmezo* estas unu vorto (kun samaj morfemoj) kie *post* ne plu estas prepozicio (sintakse). Kaj unu el la ĉefaj riproĉoj, kiujn mi faras al la akademia klasifikado de radikoj estas, ke ĝi uzas *sintaksan* terminologion por klasifiki semantike la radikojn, dum la propono de René de Saussure (*-ec*-radikoj, *-ad*-radikoj, ktp...) multe pli konsentblas.

La vorttrezoro de Esperanto estas plejparte ĉerpita el okcidentaj lingvoj, sed en leksikologia priskribo de Esperanto, ne tiom gravas la etimologia flanko ol la pure semantika. Ĉu la problemo *ami/sati* atestas evoluon? Kiomgrade la naciaj lingvoj influas al la signifo de la Esperantaj radikoj? En tiu ĉi paragrafo mi ankaŭ aludas la signifon de plurmorfemaj (kompleksaj) vortoj, sed ne la problemon de neologismoj.

Ĉar neologismoj jam apartenas al la tria ĉapitro pri pliriĉiĝo, evoluo, (re)aktualigo, reformo. Tiu nova ĉapitro pristudas ok aspektojn de la problemo en ok senrilataj paragrafoj.

Ĉe la komenco, mi prezentas, interalie, vidpunktojn de Claude Piron kaj Gaston Waringhien pri neologismoj, kaj klopodas diferencigi pliriĉiĝon, conscia kaj tuj perceptebla novaĵo en la lingvo, disde evoluo, aŭtomata kaj malrapida moviĝo de la tuta lingva sistemo stimulata de pliriĉiĝoj.

Poste mi demandas min, ĉu eraroj en ekzamenaj taskoj povas atesti evoluon. Mi pristudis sesdek tiajn taskojn transdonitajn de Franca Esperanto-Instituto, klasifikis la erarojn: ortografiaj (*tiu besto estas pli rusa* [ruza] ol *vi*), imito al la franca lingvo (*se estis ebla, mi manĝus pomon*), malimito al la franca lingvo, koncerne ek-

zemple la artikolon (*estas la dekunua kaj la duono*) kaj la akuzativon (*la harojn de la viro kiu maljuniĝas, blankiĝas*), internaj eraroj (*la ĉielo estas sennuboj* [sen nuboj, aŭ sennuba]), kiuj devenas verŝajne pli de Esperanto mem ol de la naciaj influoj, vortkonstruado (*oni tuj manĝos* [manĝigos] *la infanon antaŭ la ekfesto* [komenco de la festo]); sed tia malgranda sampla ne ebligas firman konkludon pri la temo.

La diferencan inter (re)aktualigo kaj reformo mi prezentas surbaze de la ortografiaj reformprojektoj, interalie de Optimala Ortografio de Albert Lienhardt. Tiu ĉi volas aliigi Esperanton per, interalie, forigo de ĉapelitaj literoj kaj enkonduko de *q*, *w*, *x*, *y*, tiel ke ĝi pli simulu al la naciaj lingvoj kaj estu tajpebla per la hodiaŭaj latin-literaj tajpmaŝinoj; sed ĉu Esperanto celu forigi la okcidentan imperiismon, aŭ partoprenu en ĝi? Se homoj volos ŝanĝi la komunikatan situacion en la mondo, ili ne haltos ĉe tia bagatela problemo, ĉapelitaj literoj, (problemo ja ekzistanta en multaj lingvoj, sed ne malhelpanta ties ekziston); se male ilia mondkoncepto ne bezonas Esperanton, ĉu estas saĝe altrudi ĝin al ili? La diferenco inter reformo kaj (re)aktualigo estas esence, ke reaktualiganto atentus bezonojn internajn al la lingvo, bezonojn de tiuj, kiuj efektive uzas la lingvon kaj sentas ĝenon ĉe tia aŭ alia punkto. Reformisto atentus bezonojn eksterajn al la lingvo, bezonojn de tiuj, kiuj eventuale studus la lingvon se ĝi estus alia, kaj pri tiaj homoj tute ne interesiĝas Esperantologo: por Esperantologo, Esperanto estas lingvo, por reformisto ĝi ankoraŭ estas projekto.

Konkreta problemo: ĉu ni parolu pri *komputoro*, *komputilo*, *komputero*, *komputr(il)o*, ...? Malnovan radikon *komputi* oni reĉerpis antaŭ dudeko da jaroj por konstrui la PIV-an *gas-komputilon*, kaj tio postulis enkondukon de nova radikoj por «elektrona cerbo»; *komputero*. Sed Antal Münnich daŭre ne konsentas pri utileco de tia aparta radikoj, li nepre parolas nur pri *komputilo* (kaj la PIV-a komputilo fariĝas, ĉe li, nombradilo), dum Rüdiger Eichholz, surbaze de voĉdonado okazinta en 1977, rekomendas pli novan terminon *komputoro*, verŝajne la plej uzata nuntempe. Kia ajn estos la fina solvo de la afero, oni atentu, ke kaj la termino *komputilo* kaj la termino *komputoro* estas pliriĉiĝoj de la lingvo, kiuj rezultigas evoluon de la ĝenerala signifo kaj de la radikoj *komput-*, kaj de la sufikso *-il* kaj radikfino *-or* (vd *mikroprocesoro*). Krome, eĉ se ĝi plu daŭros longe, ekzisto de pluraj terminoj por sama koncepto ne nepre ĝenos la komunikadon. Sed ĉu voĉdonado estas taŭga maniero atingi solvon de lingva problemoj?

Ĉu seksan diskriminacion praktikas tiu, kiu uzas la pronomon *li* por paroli pri homoj, kies seksoj oni ne konas? Tamen la kutimo devenas de Zamenhof mem kaj eniris oficiale la *Plenan Gramatikon*. Por starigi seksan egalecon en la lingvo, Jonathan Pool proponis en 1977 pronomon *zi = li aŭ ŝi* kaj viran sufikson *-iĉ* (paralelan al *-in*). Sed en 1980 li proponis *-ab* anstataŭ *-iĉ* (konfuzebila kun *-iĝ*) kaj viran pronomon *hi*, konservante *li* kun la neŭtra signifo «li aŭ ŝi», kiun ĝi havas plej ofte eĉ nuntempe. La refuto al *-iĉ* devenas de analizo de la lingvo kiel objekto, vidata de ekstere, sed se oni rigardas de interne la efektivan komunikadon, *-iĉ* povas disvastiĝi kondiĉe, ke ĝin oni ne uzu sisteme laŭ rigora logiko, sed nur laŭ nepre bezono. La

pronomo *hi* ŝajnas al mi pli plaĉa ol la sufikso *-ab*, se ĉu tiajn opiniojn oni apogu sur «intima konvinko» aŭ sur scienca esplorado pri antaŭvidiga lingvistiko?

Kiamaniere, praktike, ni enkonduku novaĵon en la lingvon? Se temas ekzemple pri enpuŝo de la radikoj *ali-* en la sistemon de tabelvortoj, ni rimarku unue, ke la segmentebleco aŭ nesegmentebleco de la tabelvortoj ne estas, praktike, tiel decidebla kiel postulas la teorio. *-o* kaj *-a* de *kio* kaj *kia* estas veraj finaĵoj (disigeblaj); *-es* estas iom malpli disigebla, tamen *alies* estas plej tolerata; *neni-* povas ja eliri la tabelon (vd *neniigi*), sed ne *i-* aŭ *ki-*. Ĉefa preteksto kontraŭ la tabelvortigo de *ali-* estas la postulata loka (anstataŭ maniera) signifo de *alie*: sed tiun malfacilaĵon oni povas solvi uzante, tuj, *aliel* kaj *alie* kun respektive maniera kaj loka signifoj, kiam konfuzo ne eblas pro kunteksto, kaj *alimaniere* aŭ *aliloke* se la kunteksto mem ne sufiĉe klaras: iom post iom *alie* akiros aŭtomate lokan sencon pro evoluo, kaj la situacio bezonantaj *aliloke* kaj *alimaniere* malplioftiĝos.

Dum la sesdekaj jaroj, la konflikto *-ata/-ita* dividis la Akademion en du partiojn, kaj la itista (aspektista) partio, gvidata de Gaston Waringhien kaj Ivo Lapenna, forvenkis la atistan (tempistan) partion. Mulmultaj estas la frazoj, kiujn atistoj kaj itistoj komprenas malsame, ĉefe citinda estas la jena: *oni transportis lin en hospitalon, en kiu li estis operaciita*. Por atistoj la operaciado okazis nepre antaŭ la transportado (iteco = antaŭtempeco), do okaze de pli frua enhospitaliĝo en sama hospitalo, dum la itistoj akceptas, ke la priparolata operaciado estus okazinta sekve de la transportado, ĉar la iteco atestas nur ke ĝi ja estas okazinta ĝisfine, kaj ke interesas nin la rezulto de la operaciado, ne ties disvolviĝo: por atistoj, necesus ĉisignife *-ota-* formo, por itistoj, *-ota-* formo signifus nur, ke la operacion oni planis dum la transportado, ne ke oni ĝin ĝisfine efektivigis poste. Tamen la esenco de la konflikto ne estas fundamente lingvistika, sed procedura: kian rolon devas ludi la «povo» fronte al lingvaj demandoj? Ĉefe ĉe itistoj troviĝas la ideo, ke aŭtoritata povo estas nepre kondiĉo de la sukceso de Esperanto, dum atistoj preferas toleremon. Kaj la voĉdona proceduro certe akriĝis tiun konflikton, kiu manifestiĝis per publikigo de abundo da libroj, cirkuleroj, ktp... (ĉiam nur unuflankaj, bedaŭrinde!)

Fine, mi ne pritraktas kiel tian la problemon de la akuzativo, mi nur klopodas apartigi diversajn manierojn aliri la problemon. *Interlingvistika* maniero troviĝas en la demando: ĉu akuzativo utilas aŭ malutilas al Esperanto? *Normema* starpunkto, en la citaĵo: «kiam ni neglektas la akuzativon, ni faras eraron, kaj eĉ se la granda plimulto de la Esperantistoj preteratentus la akuzativon, la verdikto restus same severa» (W. Manders). *Priskriba* vidpunkto serĉas plej taŭgan lingvistikan manieron prezenti la faktan realon; ekzemple, ĉu akuzativon oni klarigu kiel fleksion de substantivo, adjektivo, adverbo, aŭ kiel apartan morfemon? Ĉu valoras distingo inter gramatikaj kaj leksikaj morfemoj? Sed la problemon oni aliras *dinamike* metante la demandojn: ĉu la Esperanta akuzativo evoluas? Ĉu la konstatablaj akuzativeraroj atestas tian evoluon?

Por pritrakti tiajn demandojn, necesas aparta lingvistika teorio, kies bezonatan fundamenton mi klopodas prezenti en la kvara ĉapitro.

Unue, necesas aliri la esploron ne kun la celo konstati la evoluon, sed kun la ce-

lo ĝin klarigi kaj antaŭvidi: oni nepre ne diru, ke lingvoj ŝanĝiĝas (transiras de iu priskribebla sinkrona stato al alia priskribebla sinkrona stato), sed ke ili evoluas (reagas ĉiumomente al eksteraj premoj per nepercepteblaj kontinuaj moviĝoj).

En Aprilo 1978, mi klopodis aliri la nocion *eraro* ne per (objektiva) studo de efektive farataj eraroj, sed per enketo, en kiu mi partoprenis mem la komunikadon per surbendigita teksto kun lingvaj eraroj, petante la informantojn menciigi ĉiujn erarojn rimarkatajn ĉe l' aŭskultado. Jen la surbendigita teksto:

«En tiu malgranda teksto troviĝas multajn erarojn, tion mi faris intense por inciti la homojn atente aŭskulti kaj korekti ĉiujn erarojn, kiujn ili rimarkos. Do, ĉe ĉiu frazo, vi diru al mi, ĉu vi vidis unu aŭ plurajn erarojn, sed la tekston vi rajtas aŭskulti nur unu fojo, tiel ke mi povu taksu vian reagrapidecon. Ĝis la dekan de majo mil naŭcent sepdek oka, mi laboros por prepari doktorigon pri lingvistiko koncerne Esperanto. Mi elektis kiel temo de mia disertaĵo: libereco aŭ aŭtoritato en la evoluado de Esperanto. Pri tio eblas diri multe da interesajn aferojn. La diversajn temojn pritrakitajn de Sinjoro Wells en sia aperonta verko: *Esperanto kaj Lingvistiko*, mi ne forgesos utiligi. Sed krom tiun ĉi verkon de Wells, mi ankaŭ utiligos multajn aliajn Esperantlingvajn verkaĵojn pri lingvistiko. Ĉu evoluado signifas nepre modifo de la fundamentaj reguloj de Esperanto? Pri tio oni povus verki pli ol cent paĝoj! Ne mankas argumentojn por aserti, ke jes. Sed ja, mankas tempo... Eble poŝt kelkaj jardekoj niaj infanoj pravigos aŭ malpravigos tion. Nuntempe mi konas multajn opiniojn pri tio, ĉiuj malsamaj. Verŝajne la realo pravigos iun mezan vojon inter la plej evoluema kaj la plej konservema vidpunkto.»

Sed krom la intencaj eraroj, kiujn ne nepre ĉiuj informantoj rimarkis, troviĝis ne intencaj eraroj, ekzemple fonetikaj, inter kiuj unu (ĉe la frazo «pri tio eblas diri multe da...») tute malhelpis kelkajn informantojn kompreni la frazon, dum ĝi tute ne estis rimarkata de aliaj.

La analizo de tia enketo kaj de aliaj lingvaj fenomenoj laŭ dinamika vidpunkto instigis min doni al la nocio *balasto* (franclingve *redondance*, la neologismo(j) «redund(anc)o» ne ŝajnas al mi utila(j)) kernan rolon en la dinamika teorio, kiun mi prezentas. Tiu balasto ne nepre estas la sama nocio, kiel en aliaj lingvistikaj teorioj; kaj ĝi estas difinita per jenaj tri «principoj je balasto»:

Unua principo je balasto, aŭ principo de entuteco («globalisation»):

Ne ekzistas balastaj elementoj en eldiraĵo.

La balasto estas entuteca karaktero, kiun oni ne klopodu situigi ĉe difinitaj punktoj de la eldiraĵo.

Dua principo je balasto, aŭ principo de ekvilibro:

La optimuma kvanto da balasto difiniĝas per ekvilibra punkto inter la strebo de la ricevanto por elkapti la mesaĝon kaj la strebo de la parolanto por elparoli ĝin. Ĉe tiu punkto, la sumo de ambaŭ streboj estas minimuma: por plibalastigi la mesaĝon, necesas plia strebo de la parolanto, por elkapti malpli balastan eldiraĵon, pli grandan strebon bezonas la ricevanto.

Tria principo je balasto, aŭ principo de ekonomio:

La dislokigon de la informhavo («pertinence») en la diversajn punktojn de la eldiraĵo faras la ricevanto laŭ principo de ekonomio, t.e. tiel, ke li ricevu maksimuman informkvanton per minimuma strebo. Per pli da strebo ol tiu ĉi minimumo, li akiras pli da informoj ol bezonate por simpla kompreno de la eldiraĵo, kaj li uzos tian kromaĵon por rekoni la parolanton kaj situigi ĝian parolmanieron rilate la nociojn normo kaj eraro, kiujn oni altrudis al li, aŭ kiujn li mem konstruis por si.

Nia cerbo filtras la balaston tra lingva filtrilo. Sed aparte gravas, ke tia balasto antaŭekzistu la lingvistikajn unuojn, kiujn, se necese, oni povos redifini poste, ekzemple laŭ la aspekto de la grafikaĵo pri atenteco de la aŭskultanto (en normalaj kondiĉoj, tiu ĉi grafikaĵo prezentas pinton ĉe ĉiu komenco de nova unuo). La dinamika *sistemo* ne similas la sinkronan sistemon, ĉar tiu ĉi estas kvazaŭ fotografaĵo de la lingva realo, kiun oni priskribas de ekstere, dum dinamika sistemo ne estas entute priskribebbla, ĝi entenas ĉiujn subjektivajn parametrojn de efektiva komunikado, kiujn ni bezonas por antaŭvidi la reagon de la lingvoparolantaro al iu ajn ekstera stimulo. Pli interesas, en dinamika pristudo, la efektivaj realigoj («performance») ol la teoria lingva kapablo («compétence»), kaj tio ĉi devigas nin forpuŝi la diskretecon de lingvistikaj unuoj, enkondukante *kvantan* dimension en informhavo («pertinence») de lingvaj elementoj: ne necesas, ke oni povu draste decidi ĉu tia elemento estas ja informhava aŭ ne, ĝi ĉiukaze estas parte informhava, kaj la kiomo da informhavo povas multe varii laŭ *subjektivaj* nekonsciaj parametroj. La franca frazo: *mon père, il est médecin* «mia patro, li estas kuracisto» ne nepre estas pli balasta (subjektive) ol: *mon père est médecin* «mia patro estas kuracisto».

La ĉapitron mi konkludas dirante, ke ne devige la sama teorio kovru la tutan lingvistikon, sed al diversaj demandoj povas respondi diversaj memstaraj (kvankam ne interkverelaj) lingvistikaj teorioj; la ĉi-supran dinamikan teorion mi enkondukis por pristudi la demandon: libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto.

La kvina, konkluda ĉapitro, priskribas detalan planon por evoluigi Esperanton, kaj ĝi provizas precizan respondon al ĉiuj demandoj de la unua ĉapitro, en la aparta kazo de Esperanto. Necesas kiel eble plej forigi la nocion (lingvistika) *povo*, ne kongrua kunhoma kaj senhierarkia komunikado al kiu celu Esperanto. Lingvistikaj instancoj devas servi, ne trudi, ili respondu al demandoj, kaj ne obeigu sian aŭtoritaton. Iliaj respondoj apogiĝu sur scienca esplorado de la lingva evoluo laŭ dinamika, antaŭvidiga teorio, kaj tian detale ekplanitan esploradon povus fari ekzemple CED, Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo.

Fine, mi rimarkigas, ke Esperanto ne estas disigebla de la rajto je komunikado tia, kia ĝin klopodas difini Unesko en internaj dokumentoj.

Biografiaj informoj pri F. Lo Jacomo.

Naskita en Neuilly, apud Parizo, la 26an de Novembro 1954, studinta en Ecole Normale Supérieure de Saint-Cloud, altlernejo por instruantoj (1973-1978), agregaciita [Laŭ PIV, en Francujo, plej alta konkurso por rekruo de liceaj aŭ universita-

taj profesoroj] pri matematiko (1976), mi instruas matematikon ekde Septembro 1978 en postabitura licea klaso («sup agro», en Arras (200 km norde de Parizo), al studentoj 18/19-jaraj).

Mi esperantiĝis en 1971 kaj ekaktivis en diversaj asocioj ekde 1975 [IAdEM, Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj (sekretario), JEFO, Junulara Esperantista Franca Organizo (eks-prezidanto), UEA, Universala Esperanto-Asocio (Komitatano B), TESPA, Teatro Esperanto de Parizo (Prezidanto)].

Mi eklernis la ĉinan lingvon dum la unua (postabitura) studjaro pri matematiko («math sup», 1971/72), eĉ preparis kelkajn diplomerojn pri la germana lingvo samtempe kiel mi magistriĝis pri matematiko (1973-1975).

Kreskanta ŝato al la lingvoj ĝenerale kaj al Esperanto speciale kroma ioma seniluziigo pro la hodiaŭa formalista praktikado de «moderna matematiko», igis min konatiĝi kun la funkciisma lingvistika skolo de André Martinet (novembro 1974). Tuj post agregaciigo pri matematiko (1976), mi aliĝis al triaciklaj studoj pri lingvistiko, kiuj finiĝis la 29an de Junio 1981 per defendo de doktoriga disertacio, gvidita de André Martinet, pri «libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto». En 1978, mi fariĝis sekretario de SILF (Internacia Societo de Funkciistaj Lingvistoj, skolo de André Martinet).

Donacu al viaj amikoj
kaj al vi mem
la altnivelan

isae
scienca revuo
internacia scienca asocio
esperantista

Jus aperis n-ro 133. Ĝis la fino de 1981 aperos n-roj 134, 135, 136, kaj ĝis la fino de 1982 n-roj 137 ĝis 144.

Abonkötizoj estas:

16 svisaj frankoj	por volumo 30 (n-roj 133 kaj 134)
20 svisaj frankoj	por volumo 31 (n-roj 135 kaj 136)
20 svisaj frankoj	por volumo 32 (n-roj 137 ĝis 140)

Scienca Revuo estas abonebla ĉe via Landa Delegito de ISAE, aŭ ĉe UEA, aŭ rekte ĉe:

«Scienca Revuo», Edistudio, c.p. 213, I-56100 Pisa, Italujo, pĉk 12230561 [1 sv.fr. = 700 it.liroj; pagante per banko aŭ ĉeko aldonu 2 000 lirojn pro bankaj kostoj]

Raporto

pri la enkonduko de Esperanto en italan elementan lernejon.
Lernojaro 1979-80

Nino Pala, Cagliari

Tiu ĉi ne estas didaktika raporto. Ĝi nur celas priskribi la vojon, kiun mi sekvis por enkonduki Esperanton en la lernejon, kie mi instruas.

Pri didaktiko, programoj, lernmaterialo, lerneja korespondado, celoj de la kurso mi tre volonte kontaktos gekolegojn en la tuta mondo.

Fakte, mi tre bedaŭras ke mi entreprenis ĉi tiun laboron en relativa izoliteco, sen konstantaj kunligoj kun alilandaj lernejoj.

Ĉar verŝajne la kurso de Esperanto en mia lernejo ripetiĝos dum la venontaj jaroj, mi esperas ke de gekolegoj venos proponoj pri kunlaborado, ankaŭ cele al ebla estonta renkontiĝo.

En la lasta lernjaro, ekde septembro 1978a, mi translokiĝis al (por mi) nova lernejo: la ŝtata lernejo de la kvartalo CEP en la urbo kaljaro (Cagliari), en Sardinio, kie oni konfidis al mi dudekon da sesjaraj infanoj: la unua klaso.

La Ŝtata Elementa Lernejo CEP ne estas unuopa konstruaĵo. Ĝi konsistas el sufiĉe vasta ĝardeno; el ĉefa konstruaĵo, kie troviĝas la direktorejo, la oficejoj, halo por la kunvenoj, biblioteko kaj sportejo; kaj tri pavilonoj, en kies teretaĝo kaj supra etaĝo estas la klasejoj. La tri pavilonoj havas entute 24 klasejojn kaj, ĉar funkcias en la lernejo 31 klasoj, plus (ek de ĉijare) kvar specialaj kursoj, la klasejoj ne sufiĉas por samtempa instruado al ĉiuj lernantoj: ĉirkaŭ 750. Deko da klasoj, do, je alternaj semajnoj, vizitadas la lernejon jen matene, jen posttagmeze.

La lernejo troviĝas en la kvartalo C.E.P. (Popola Loĝ-Centro), je la periferio de la urbo, kiu nuntempe havas ĉ. 300.000 enloĝantoj.

Nova lernejo, memvole elektita ĉar apuda al mia nova loĝejo, post dudek jaroj da instruado, kies lastaj ĉe instituto por blinduloj de la sama urbo (kienlastatempe mi sukcesis enkonduki Esperanton).

Nova lernejo: do novaj gekolegoj, nova lernejestro, novaj gepatroj, kun kiuj interrilati. Entute — nova medio, kie Esperanto estis ĝis tiam tute fremda.

Kiel enkonduki la internacian lingvon en tiun novan medion? Kiujn unuajn paŝojn fari?

Mi estus eble povinta ekinstrui la lingvon al miaj dudek lernantoj, paralele kun la instruado de la nacia lingvo. Sufiĉus nur konvinki ties gepatrojn pri la boneco de la

iniciato. Por instrui la anglan, ekzemple — neniuj malfacilaĵoj. Estas ja prestiĝe havi filon, kiu vizitadas kurson pri la angla lingvo. Ĝis kioma grado li ĝin lernos, tio ĝenerale ne tre gravas.

Lastatempe en Italio oni distrumpetas ministerian projekton (projekto I.L.S.S.E.) por instruado de fremdaj lingvoj (fakte nur la angla kaj la franca, kun lastatempa aldono de la germana) en la elementaj lernejoj. Tiu projekto, jam funkcianta en kelkaj urboj, antaŭvidas la instruadon de tiuj lingvoj far unuagradaj instruistoj, post pseŭda re- aŭ nov-alproprigo de bazaj nocioj pri la direktaj lingvoj. Nome, unuagradaj instruistoj rajtus, eksperimente, instrui la fremdan lingvon kune kun la ordinaraj studobjektoj — ĉiu al la lernantoj de sia propra klaso.

Ankaŭ ekster tiu projekto, laŭ diversaj aranĝoj, oni jam de longe instruas fremdajn lingvojn en multaj elementaj lernejoj.

Okaze de tiutemaj debatoj en instruistaj rondoj, mi plurfoje kontestis la validon de la projekto I.L.S.S.E. ĉefe pro la evidenta diskriminacio rilate ĉiujn lingvojn, krom la tri supre direktaj, sed ankaŭ pro aliaj motivoj. Per ili oni interalie emfazas, ke la instruado de fremda lingvo far la klasinstruisto estos pli efika ĉar li ja pli bone konas la infanojn ol «ekstera» lingvo-instruisto (sed kio malhelpas ke ankaŭ ĉi «ekstera» fariĝu «interna» kiel la klasinstruisto, se veras, ke la lingvo-instruado devos integriĝi kun la tuta lerneja agado?). Oni ankaŭ aldonas, ke eventualaj mankoj rilate al lingvoregado far de la klasinstruisto estus facile kompenseblaj per la uzado de aŭdovidaj aparatoj, per kiuj instruisto kaj lernantoj kvazaŭ lernus kune.

Estas diskutinde, ĉu entute oportunas publike rebati (ja estus facile!) ĉi lastan aserton, ĉar finfine ĝi povus utili ĝuste al Esperanto (se iam la projekto allasus ankaŭ la internacian lingvon): ne estas sekreto, ke nia movado disponas ĝis nun je nesufiĉa nombro da instruistoj kontentige regantaj la lingvon. Evidente estas tamen, ke tiaj argumentadoj estas pedagogie ne seriozaj, kaj estas facile interpreti ilin kiel malbone kaŝitaj pretekstoj por fari nur surpaperajn reformojn. Reformoj je malalta kosto, kiuj unuflanke, flatante la ambicion de fremdlingve nespertaj instruistoj (ja estas esceptoj, kompreneble!) surŝarĝas ilin per ne facile plenumeblo tasko; aliflanke, ili kontentigas (surpapere) la kreskantajn postulojn de la civitanoj kaj de internaciaj instancoj intensigi la instruadon de fremdaj lingvoj en nia lando.

Tiel dirite, se viva estas la ĝenerala intereso rilate al la lernado de fremdaj lingvoj (legu: «la angla»), tute indiferenta estas ĝis nun la intereso rilate al la lernado de la internacia lingvo.

Mi ja intencis enkonduki Esperanton en mian novan lernejon, sed mi ne volis limigi ĝin al mia tiama klaso, kaj tio pro diversaj kialoj, nelaste al la fakto, ke la iniciato restos relative izolita, kun malmultaj eblecoj involvi vastajn grupojn da geinstruistoj kaj gepatroj.

Ek de la lasta lernjaro, mi do planis agadon, kiu permesos veki en mia lernejo ĝeneralan intereson, kaj samtempe permesos akiri donitaĵojn kaj freŝan materialon por ekhavi pli konkretajn eblecojn, kiam mi proponos la instruadon de la internacia lingvonpli vaste.

Jen, sinteze, la ĉefaj etapoj de tiu agado.

1978, decembro. Mi kontaktas kvar koleginojn, kiuj instruas en la kvinaj klasoj (infanoj 10-11-12-jaraj) kaj mi proponas ke mi instruon Esperanton al iliaj gelernantoj dum ties lernhoroj: mi farus tion dum mia libera tempo. La aranĝo estas ebla ĉar tiuj klasoj vizitadas la lernejon ĉiam matene, dum mi, kun mia unua klaso, deĵoras alterne: unu semajnon matene kaj unu pm. Post konvinkaj motivoj, la propono estas akceptita. Tio ne postulas oficialan permeson de la lernejestro.

1979, januaro. La lecionoj de Esperanto komenciĝas kaj efektiviĝas laŭ la ritmo de du lecionoj semajne, je alternaj semajnoj. Kutime la infanoj grupiĝas po du klasoj (kvindeko da infanoj kune!). Mi instruas laŭ rekta metodo en la ĉeesto de la klasinstruistinoj. Ni ekuzas la lernolibron: Solomon, Esperanto por infanoj, kies tekstojn mi parte surbendigis. Tio ebligas kelkfojan utiligon de la lernmaterialo ankaŭ sen mia ĉeesto.

Samtempe mi kontaktas ankaŭ aliajn kolegojn, kun la celo kune ellabori projekton de eksperimentado por grupo da difinitaj klasoj, kiu, se aprobita, permesos oficialan enkondukon de novaj studobjektoj ne antaŭviditaj en la normaj programoj.

La projekton oni povas prezenti surbaze de la D.P.R. (Dekreto de la Prezidento de la Respubliko) n-ro 419, 31.5.74.

Post konsultado de gepatraj reprezentantoj, necesas laŭvica aprobo de (a) geinstruista konsilantaro; (b) lerneja konsilantaro; (c) favora raporto far la provinca lernejestro; (ĉ) fina aprobo far la Ministerio pri Publika Instruado.

La eblecoj de sukceso estas malmultaj.

La limdato por la prezentado alproksimiĝas.

La propono allogas iujn kolegojn kaj ni kune prilaboras la projekton, kiu ĉefe antaŭvidas la instruadon de la itala lingvo laŭ pli modernaj metodoj. La enŝovo de Esperanto mi ĉefe pravigas pro la utileco de kompara lingvo-instrumento neŭtrala. Se ne varme akceptita, tamen ĝi ne estas malaprobata. La novmetoda instruado devus okazi far «specialistoj» (dungotaj je kosto de la ŝtata administracio) kunlaborantaj kun la klasinstruistoj: do dum la normalaj lernhoroj. La avantaĝo de tiu projekto estas ĉefe (a) konstanta lernantaro; (b) la lecionoj de Esperanto okazos far lingvoinstruisto dum la normalaj lernhoroj, do samrange kaj interlige kun la aliaj studobjektoj en ĉeesto de la klasinstruistoj; (c) la eksperimentado daŭros tri jarojn.

La 11an de januaro ni prezentas la skizitan projekton al la geinstruista konsilantaro: ĉiu el ni prezentas la eron de li prilaboritan. Mi prezentas du erojn, inter kiuj, kompreneble, Esperanton. Post debato, la projekto estas aprobita en ĝia tuteco. Oni elektas la proponintojn kiel membrojn de komisiono, kiu redaktos la definitivan projekton. Ni devos kompletigi la tuton dum nur unu tago. Lastmomente iu rimarkas ke la parto, kiu rilatas Esperanton aspektas tro ampleksa. Tuj alia insiste proponas la aldonon de la angla lingvo. Tio tute ne kongruas kun la motivoj rilataj Esperanton. Mankas la tempo pro plua diskutado. Tamen oni ne povas pro tio malpaciĝi, kaj pri la angla oni ne parolis dum la ĉefkunveno.

La 12an de januaro la projekto, haste tajpita far diversaj personoj estas prezenti-

ta al la juĝo de la lerneja konsilantaro, kiu aprobas ĝin.

La 15an de januaro la lernejestro sendas la projekton al la Provinca Lernejestro por plusendo al la Ministerio pri P.I.

1979, februaro-marto. Je alternaj semajnoj, dum mia «libera» tempo mi daŭrigas la instruadon de Esperanto al la kvar kvinaj klasoj. Samtempe, kompreneble, mi instruas en mia oficiala klaso.

1979, aprilo. Ni estas bonŝancaj. Antaŭ la Paskaj ferioj vizitas nian urbon belga esperantisto instruisto André Pierard, kun sia familio. S-ro Pierard, kiu instruas ankaŭ Esperanton al siaj gelernantoj, vizitas nian lernejon kun siaj du filinoj 10-11-jaraj: Isabelle kaj Valéry. Ni aranĝas renkontiĝon kun niaj cent esperantistetoj. La renkontiĝo, zorge preparita, permesas al niaj infanoj fari aron da antaŭe lernitaj demandoj, al kiuj parte la belgaj knabinoj, parte ilia paĉjo respondas. Samtempe tradukadon (por la ĉeestantaj neesperantistaj gastoj!) prizorgas mia 11-jara filino Helena, denaska esperantistino, ankaŭ ŝi lernantino en la sama lernejo. La tuta afero faras efikan «bruon».

1979, majo. La infanoj de la eksperimentaj klasoj kapablas, se ne flue paroli (kompreneble!) almenaŭ legi aŭ legeti en Esperanto. Multaj el ili ĉe legas tre bone simplajn tekstojn.

Mi proponas al ili elpensi po infano kelkajn demandojn por demandaro sendota tra la mondo. Baldaŭ kolektiĝas centoj da folietoj kun demandoj direkteblaj al infanoj aŭ plenaĝuloj en diversaj landoj: kelkaj en kvazaŭesperanto, plejparte naciolingvaj. Post kribrado, ni interkonsentas pri dudek unu el ili. Tiel naskiĝas nia parolata letero, kiu montriĝos tre fruktodona.

Ankoraŭ oni ne scias, ĉu la Ministerio pri Publika Instruado aprobos nian januaran projekton.

Prezentiĝas intertempe nova ebleco enkonduki Esperanton en la lernejon: nome, oni povas prezenti novan projekton al la Provinca Lernejestro por la starigo de eksterlernejaj kursoj pri... io ajn (aŭ proksimume). Tio surbaze de la artikolo 1 de la leĝo n-ro 820 de la jaro 1971a.

Mi ne tre emas utiligi tiun rimedon por Esperanto, ĉar la vizitado de tiaj kursoj estante ne deviga, oni riskas havi ne konstantan lernantaron kaj fiaski ĝuste pro impostioma foresto de lernantoj. Tio ja okazis al multaj tiaj aranĝoj, kie la nombro de la lernantoj tiom malkreskis je la fino de la lernjaro, ke oni ne plu renovigis la kursojn por la sekva jaro. Fiasko pro tiu motivo estus ja neoportuna malsukceso.

Tamen, konsiderante ke tre probable oni ne aprobos la jam prezentitan projekton, mi juĝis oportune ne forlasi la eble lastan ŝancon.

La 28an de majo la geinstruista konsilantaro estas kunvokita de la lernejestro por diskuti pri la oportuneco peti de la Provinca lernejestro la starigon de eksterlernejaj kursoj. La debato longiĝas kaj oni prokrastas al venonta kunveno.

1979, junio. Post konsultado de la gepatraj reprezentantoj, la geinstruista konsilantaro aprobas, la 8an de junio, la prezentadon — ĉifoje ne al la Ministerio pri P.I. sed al la Provinca Lernejestro — de projekto pri starigo de eksterlernaj kursoj. Praktike, temas pri la utiligo de la sama projekto prezentita al la Ministerio pri P.I., kun nur kelkaj formalaj modifoj. Oni do petas, sub nova formo, ankaŭ kurson de Esperanto.

La 12an de junio ankaŭ la lerneja konsilantaro aprobas la «novan» projekton.

1979, julio-aŭgusto. Dum la lernejoj atingas la lernejon la unuaj respondoj al nia «parolata letero». La infanoj, kiuj faris la demandojn estas jam for kaj ili ne revenos al nia lernejo, sed transiros al la mezgrada lernejo.

Inter la unuaj respondoj, estas tiuj el Belgio, Svislando, Aŭstrio, Britio kaj Ĉinio.

1979, septembro. La Provinca Lernejestro informas, ke la Ministerio pri P.I. malaprobas nian januaran projekton pri eksperimentado.

La nova lernjaro komenciĝas. Mi ekinstruas al miaj lastjaraj gelernantoj, kiuj nun vizitadas la duan klason.

1979, oktobro. La Provinca Lernejestro publikigas la dekreton kun la listo de la aprobitaj eksterlernaj kursoj en la tuta provinco. Por nia lernejo estas aprobitaj kvar kursoj: teatra animado, fizika edukado, angla lingvo, Esperanto. Tio signifas ke por ĉiu kurso la lernejestro, konsultinte la geinstruistan konsilantaron, rajtas proponi al la Provinca Lernejestro la nomojn de kvar ordinaraj instruistoj, kiuj estu ankaŭ fakuloj pri la rilata fako. Tiu instruisto povas, aŭ ne, aparteni al la koncerna lernejo. Li tamen lasos sian klaslaboron por dediĉi sin al la nova instrulaboro.

Iel, Esperanto oficiale eniros en nian lernejon!

Ĉirkaŭ la 20an de oktobro alvenas du kopioj de «El Popola Ĉinio» kun artikolo pri nia «parolata letero».

Jam certa pri la starigo de la kurso de Esperanto, mi devas nun pensi pri la gelernantoj. Ĉu ili partoprenos? Kiomnombro?

Mi plue deĵoras kiel klasinstruisto en mia dua klaso, kiun mi baldaŭ lasos por transpreni la novan laboron. La interrilatoj kun la gepatroj, ĝis nun bonegaj, povas en tia okazo akriĝi. Fakte ne mankas bedaŭroj kaj diskretaj plendoj. La konsidero ke mi plue zorgos pri la infanoj kadre de la Esperanto-kurso nur parte trankviligas la gepatrojn, kiuj, tute prave, taksas negativa la ŝanĝon de instruisto kaj sekve de instrumentado.

La 24an de oktobro mi sendas al la gepatroj de ĉiuj gelernantoj (ĉ. 750) informleteron pri la starigo de la Esperanto-kurso, kun aldonita enket-demandaro pri Esperanto.

La 26an de la sama monato aperas en la loka tagĵurnalo «*L'unione Sarda*» artikolo, kiun mi verkis pri la sama temo.

1979, novembro. Kolektiĝas la enketiloj, kiujn la gepatroj resendas amase: el ĉ. 750 respondas pli ol 500. Al la demando «ĉu vi estas favoraj rilate al ĉi tiu lerneja inicia-

to?» (la enkonduko de Esperanto): 85% respondas «jes»; 10% respondas «ne»; 5% ne respondas aŭ donas dubajn respondojn.

Daŭrigante la inform-agadon pri Esperanto, mi sendas invitilon al ĉiuj gepatroj kaj geinstruistoj por kunveno okazonta la 16an de novembro, kie mi klarigas la ĉefajn trajtojn de la internacia lingvo, kaj mi aŭskultigas kelkajn respondojn al nia «parolata letero». Partoprenas je favora sinteno ĉirkaŭ 70 personoj. La aŭskultado de la eksterlandaj voĉoj, zorge preparitaj kun surafixe transkribitaj tekstoj, ludas gravan rolon kaj montriĝas tre efika kaj konvinka pri la disvastigiteco de Esperanto.

Formiĝas komitato de gepatroj. Ili elaboras tekston de letero, sendota al la lernejestro, pro plusendado al la «kompetentaj aŭtoritatoj», de kiuj oni petas ke Esperanto estu laŭeble instruata dum la noramlaj lernhoroj. Jen doni la rajton estas ja ekster la povo de la lernejestro, sed la tuta afero helpas por plue evidenti la ĵus vekigitan intereson al Esperanto far la gepatroj. Ĉirkaŭ ducent subskribitaj kopioj de tiu letero atingas la tablon de la lernejestro.

La Provinca Lernejestro aprobas la projektojn kaj donas ĝeneralajn instrukciojn por la efektiveco de la kursoj.

1979, decembro. Fine atingas min la oficiala permeso de la Provinca Lernejestro, per kiu li sciigas min, ke mi tuje estas enoficigita al la lernejo CEP (kie cetere mi jam deĵoras) por la instruado de Esperanto dum la lernojaroj 1979-80.

Post kelkaj tagoj komenciĝos la kristnaskaj ferioj. Mi lasas mian klason, kiun oni konfidas al nova instruistino.

Dum kelkaj tagoj mi kaj la tri aliaj kolegoj «specialistoj» kvarope laboras por organizi la kursojn. Interkonsente kun la gepatraj reprezentantoj kaj la ceteraj gekolegoj estas decidite ke oni lasu al la gepatroj libere elekti po du kursojn por siaj infanoj. Nura limigo estu ke oni elektu nur unu el la du lingvoj.

Antaŭ la komenco de la kristnaskaj ferioj alvenas la enskribpetoj: ĉ. 300 por fizika edukado; ĉ. 270 por la angla lingvo; ĉ. 180 por Esperanto; ĉ. 120 por teatra animado.

1980, januaro. Post la vintraj ferioj rekomenciĝas la lernejo. Kelkaj tagoj pasas antaŭ ol ni povas komenci la kursojn. Estas malfacile kombini la horaron en maniero ke ĉiu infano partoprenu ambaŭ elektitajn kursojn. La afero estas komplika tial, ĉar ne ĉiuj klasoj havas la «normalajn» lecionojn dum la samaj horoj. Kelkaj klasoj vizitadas la lernejon ĉiam matene — kaj ties gelernantoj partoprenos la kursojn ĉiam posttagmeze. Kelkaj vizitadas la lernejon alterne: unu semajnon matene kaj unu semajnon ptm. Fine ni trovas kontentigan solvon al ĉiu problemoj.

Por la kurso de Esperanto formiĝas ses grupoj. Ĉiu grupo vizitadas la kurson dufoje semajne. Ĉiu leciono daŭros du horojn (kiam matene) aŭ 1 horon kaj 45 minutojn (kiam ptm).

La unua leciono de la kurso de Esperanto okazas la 7an de januaro por la grupoj «A» kaj «B»; la 8an por la grupoj «C» kaj «D»; la 9an por la grupoj «E» kaj «F».

La instruado efektiviĝas laŭ la rekta metodo, kun abundaj bildoj kaj konkretaj objektoj. La unuajn lecionon partoprenas multnombraj gepatroj. La ĝenerala sinteno estas favora, eĉ entuziasma.

Kelkaj familianoj (gepatroj, pli aĝaj fratinoj) eĉ partoprenas pli-malpli regule la lecionojn kun la infanoj ĝis la fino de la lernjaro. Mi tion favoras ĉar ilia ĉeesto tute ne malhelpas la lernadon. Male, tio estas efika kaj stimula. Mi nur postulas — kaj tio estas favore akceptata — ke ili ne estu nuraj spektantoj, sed ke ili aktive partoprenu la lernejan laboron; ni fakte kune kantas, ludas, skribas, interparolas.

1980, februaro. Kelkaj familianoj, kiuj konstante partoprenas la lecionojn kun la infanoj ekformas komitaton kun la celo helpi la Esperanto-instruiston kaj starigi flankajn agadojn (surbendigoj, korespondado, fotoj, eltondado de bildoj por pre-pari didaktikajn slipojn aŭ afiŝojn, k.t.p.) kvankam la celoj nur parte realiĝas, ilia helpo estas ĉiurilate tre grava.

Samtempe, oni esprimas la deziron aranĝi kurson de Esperanto por plenaĝuloj. Tion sugestas ankaŭ diversaj geinstruistoj de aliaj lernejoj. Pere de la helpo de la kvartala komitato (eksterlerneja) kaj de du oficistinoj de la lernejo, kontaktinte la lernejestron, ankaŭ la kurso por plenaĝuloj estas organizita. Kunhelpo por la instruado du esperantistaj gekolegoj.

1980, marto. Dume la kurso por infanoj sukcese daŭras (la nombro de la partoprenantoj estas ĉiutage kontentiga, tiel dementante la antaŭajn pridubojn), komenciĝas la kurso por plenaĝuloj: senpaga kaj malfermita al ĉiuj. Enskribiĝis sesdeko da personoj (gepatroj kaj geinstruistoj).

La lecionoj por la plenaĝuloj okazas dufoje semajne: marde kaj vendrede dum la vespero, je la fino de la lernejaj lecionoj en la halo de la sama elementa lernejo CEP.

La 15an de marto ni havas la plezuron ricevi la viziton de Prof-ro Mario Dazzini, jen kiel Prezidanto de IEF, jen kiel Ĝenerala Sekretario de ILEI. Prof-ro Dazzini venis en Sardinon por partopreni la laborojn de la ĵus okazonta unua kunveno de sardaj esperantistoj. La vizito de prof-ro Dazzini en nia lernejo estas grava evento por niaj infanoj.

1980, aprilo. Nia lastjara «parolata letero» (eĉ se multaj adresitoj ĝis nun ne respondis) evidentiĝas fekunda iniciato. De tempo al tempo kelkaj respondoj alvenas. Kvankam la lingvonivelo de la infanoj ne permesas plene utiligi la eksterlandajn sonbendojn, tiuj efike impresas la gepatrojn kaj geinstruistojn. Oni ĝenerale ne pridubas la seriozecon de la kurso de Esperanto.

Post interkonsento kun la lernejestro de la apuda mezgrada lernejo, kaj pere de la aprobo de mia lernejestro, mi ricevas la viziton de la geknaboj, kiuj pasintjare ebligis la realigon de la «parolata letero». Ili venas por aŭskulti la respondajn sonbendojn. Tio estas bona ebleco por paroli pri esperanto kaj en esperanto kun diversaj instruistoj de la apuda mezlernejo, kun kiuj, kutime, mankas kontaktoj.

Necesas daŭre kontakti la gepatrojn de miaj lernantoj por ke la infanoj kiel eble plej regule plue vizitadu la kurson. Ĉar voĉaj kontaktoj estas malfacilaj, mi de tempo al tempo sendas al ili pere de la infanoj, multobligitajn «komunikojn».

1980, majo. La 27an finiĝas la kurso de Esperanto por plenaĝuloj. Dudeknaŭ el la partoprenintoj (plejparte geinstruistoj el diversaj lernejoj, malmultaj gepatroj) partoprenas la finan unuagradan ekzamenon. Kelkaj jam membriĝis, pere de nia ĵus starigita regiona unuiĝo al la nacia Esperanto-asocio.

Alvenas el Japanio informbulteno. En ĝi estas japanlingven tradukitaj, propagandcele, la demandoj de nia parolata letero kun respondoj. Tamen la rilata sonbendo, jam de longe sendita, ankoraŭ ne atingis nin.

Konstatinte la pozitivajn rezultojn, la geinstruista konsilantaro decidas favore rilate la daŭrigon de ĉiuj eksterlernejaj kursoj por venonta jaro. Tion decidi tamen rajtas la Provinca Lernejestro.

Je la fino de la monato praktike finiĝas ankaŭ la kurso de Esperanto por infanoj. La 5an de junio ĉesos la agado en ĉiuj lernejoj pro la administraj balotadoj.

El la komenciĝintaj 174 gelernantoj, vizitadis la kurson kun bona reguleco 152 geknaboj.


La atingita lingvo-nivelo estas ĝenerale kontentiga kaj promesplena.

Sonnabend lerneja eksperimento

157 paĝoj
sciencnivele
prilaboritaj
flulegeblaj
kaj kaptaj
kiel romano

12 gld.

Edistudio, 1981
c.p. 213 I-56100 Pisa



Kelkaj interesajoj el la 15-a Konferenco de Ilei en Gödöllő — Hungarujo — 11-21 Julio 1981

H. Sonnabend

Partoprenis la konferencon 161 personoj el Aŭstralio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Francio, Demokrata Respubliko Germanio, Federacia Respubliko Germanio, Hungario, Italio, Jugoslavio (Slovenio kaj Serbio), Luksemburgio, Malto, Pollando, Svedio.

La inaŭguro okazis en la aŭlo de la nova universitato (dimanĉon, 1981-07-12) Sidis en la aŭditorio fronte al la aŭskultantoj ĉe longa tablo 16 personoj: s-ino E. Fognagy, ĉefreferanto de la kultura ministerio, d-ro I. Gnesar de la konsilantaro de la Pest-departemento, s-ino J. Bagy, sekciestrino pri kulturaj aferoj en la partio en Pest-departemento, s-ro J. Benedek, urbestro de Gödöllő, s-ro G. Herezenik, partia sekretario de urbo Gödöllő, d-ino Felsőne Szabo, ĝenerala sekretario de UEA, d-ro I. Pethes, vicprezidanto de HEA, prezidanto de MEM, d-ro K. Kocsis, vicdirektoro de la universitato en Gödöllő, d-ino K. Kovács, sekretario de la landa Pedagogia Sindikato...

La prezidanto de ILEI preligis pri la temo de la 15a konferenco: «La unuiga rolo de Esperanto de diversaj sociaj/lingvaj sistemoj».

Estrarkunsido je dimanĉo: ĝi konstatis ke kelkaj sekciestroj ne plu ĝiris la membrokotizojn. La valida statuto preskribas, ke aŭtomate post dujara nepago ĉesas la membreco en ILEI. Perdis sian membrecon: Grekujo, Islando, Japanujo, Kolombio, Koreujo, Kubo, Luksemburgio, Malagasujo, Nov Zelando, Rumanujo kaj Sovet-Unio!

D-ro Dazzini informis la estraranojn, ke prof. d-ro Tacconi Pier Marcello, Italujo donacis al ILEI 500.000 lirojn! Koran dankon al samideano Marcello!

Okazis lingvokursoj: gvidis la komencantojn: s-ino H. Hegedüs, la progresintojn: s-ino C. Dazzini.

La ruĝa pedagogia fadeno dum la konferenco estis la altkvalitaj prelegoj de prof. d-ro I. Szerdahelyi pri «Metodologio»; sed nepre mencienda estas la prelego de s-ino K. Baharey Nádudvari; «Pri la instruado de handikapuloj». Atentigis la prelego de d-ro O. Haszpra: «Rezultoj kaj tendencoj en la esenca aplikado de Esperanto».

La kultural valoron de la hungara popolteatro ekvivis la konferencanoj en Budapeŝt: Geedziĝfestoj en Eeser, popolaj dancoj kaj muziko (Lundon 1981.07.13).

Ebleco por studi la literaturon de Esperanto: prelego kaj seminario kun d-ro V. Benczik. Alian gravan aspekton de Esperanto traktis H. Hegedüs kaj Zs. Gyarmathy: «Instruado de Esperanto en elementaj klasoj».

Sonis aparte la temo: «Antilernejo: krizo de la tradiciaj instruistoj». Prelegis: S. Révész. Ĉiam interese: «Nova Skribo» de Emiriko Marcetta. (Bedaŭrinde multaj komprenas nur novan alfabeton!).

Novtipan prezenton de aŭd-vida instrumaterialo demonstris B. Wacha (Mardon 1981-07-14)

Grava evento: M. Kovacs informis pri la rezultoj de la 3a mezurado de la Pedagogia-Didaktika Eksperimento.

Pri la famaj «Kunordigaj konferencoj en Jugoslavio, pri la lerneja instruado de Esperanto» referis d-ro P. Zlatnar.

La tre konata T. Sekelj, mondvojaĝanto, aŭtoro de pluraj interesaj libroj (la lasta, «Mondo de travivaĵoj», ĝuste pri liaj “globtroteraj” spertoj) lumbildprelegis pri «Vojaĝo tra Papuo-Novgineo». (Merkredon 1981-07-15)

La estraro de ILEI estis gasto de la Landa Pedagogia Sindikato en Budapeŝt. Oni promesis starigi Esperanto-kursojn ĉe sindikatoj! (Ĵaŭdon 1981-07-16)

Tuttaga ekskurso al Szentendere kaj Viségrad. Dum horoj sur la Danubo por multaj unika travivaĵo — Ekzemple: sur Malto ne fluas riveroj! (Vendredon 1981-07-17)

Kulturaj eventoj: La konferencanoj favore spektis la programon de la infanoj (unufoje partoprenis ankaŭ infanoj nian konferencon: preskaŭ kvindek!): ili kantis, ludis skeĉojn kaj puĉteatron.

Hungara vespero: Pri la hungara lingvo prelegis s-ino Zs. Varga-Haszenits; d-ino R. Barabás pri «Bela Bartok». Per lumbildoj kaj muziko prezentis Johano Inguzs Hungarion. (Sabaton 1981-07-18)

La estaro decidis kunsidi en Peine (Germanio/Loĝloko de la prezidanto) de la 15a de Novembro ĝis la 18a (1981).

La estraranoj J. Inguzs kaj O. Olsson deklaris, ke ili ne plu intencas kandidatiĝi por la nova labor-kaj elektperiodo. Do, kandidatoj estas nun serĉataj! Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario (Sonnabend, Dazzini) estos pretaj daŭrigi siajn oficojn se la asembleo 1982 voĉdonade konfirmos la pretecon. (Dimanĉon 1981-07-19)

Asemblea kunveno: La Ĝenerala Sekretario informis kaj prelegis pri la labora stilo de ILEI. Li jam nun skizis la kontribuon de ILEI al la 100-jara datreveno de la Internacia Lingvo Esperanto. La unuanima aprobo de la aldonita rezolucio montras la direkton!

Rezolucio.

de la 15-a Konferenco de ILEI — Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Gödöllő (Hungarujo) 11-21a de Julio 1981.

La konferencanoj el 15 landoj, kunvenantaj on sia 15a konferenco de la 11a ĝis la 21a de Julio 1981, en Gödöllö (Hungarujo), sub la ĝenerala temo: "La unuiga rolo de Esperanto de diversaj sociaj/lingvaj sistemoj,

konstatas,

- ke ankoraŭ, ĝis nun, la insistaj klopodoj plibonigi la lingvan interkompreniĝon ne konsiderinde sukcesis;
- ke pliiĝas la plendoj, ke infanoj lernantaj lingvojn (devige enkondukitaj en la lernejojn) ne korekte regas la gramatikon, prononcadon kaj idiomojn;
- ke la interŝanĝo de kulturaĵoj ne plenumas la ĝeneralajn atendojn;
- ke la emo lerni «vivantaj lingvojn» rapide malkreskas kaj lige kun ĝi la kvalito de la lingva kono;
- ke nenie estas konstateble ke la komprenemo pri la popoloj kreskis;
- ke la gelernantoj, pro manko de aliaj lingvokonoj, plene blindiĝas rilate la eksterajn kulturojn;
- ke ĝis nun nenia respondeca instanco, sciencaj lingvistoj trovis unu esencan argumenton por objektivite kontraŭstari Esperanton.


La jaro 1987 memorigas al la jaro de Internacia Lingvo Esperanto, 1887-1987 (eldonado de la unua gramatiko de Esperanto).

Pro tio ILEI alvokas registarojn, sindikatojn, kulturajn instituciojn, ekleziojn, gepatrojn kaj ĉiujn personojn interesatajn al la solvo de la lingva problemo en la mondo, kunlabori en aparta pedagogia kongreso, kiu okazu en la jaro 1987 sub la aŭspicio de Unesko.

Multaj Esperanto-organizaĵoj povas science kaj sperte prui ke Esperanto plenumas ĉiujn kondiĉojn por unuigi la diversajn lingvajn sistemojn.

(Unuanime aprobita dum la asembleo-kunsido en Gödöllö, Hungarujo la 20an de Julio 1981. Respondeca: Helmut Sonnabend, prezidanto de ILEI.)

TIBOR SEKELJ
MONDO DE TRAVIVAĴOJ



Tibor Sekelj MONDO DE TRAVIVAĴOJ

La senpaŭza vivo de la fama esploristo en tri-dek rakontoj verkita en la kutima atentokapta stilo de Sekelj.

21 cm, 288 paĝoj + 24 fotoj de la aŭtoro, 24 nl.gld.
(+10% sendokostoj; 1/3 rabato por memoj de minimume 3 ekz-oj.)

Edistudio

c.p. 213 I-56100 pisa
italujo — pĉk 12230561

Statuto kaj Ĝenerala Regularo de Ilei Proponoj, amendoj kaj korektoj

Statuto.

Artikolo 1.

La organizaĵo estas nomita: fariĝu: La organizaĵo estas nomata: en la plua teksto nomita: fariĝu nomata:

Artikolo 2.

2.1 ILEI estas fondita en 1949

2.4 ... Kategorio C, en aŭgusto 1977,...

2.7 La bazo de la laborpolitiko de ILEI fariĝu La bazo por la laboro de ILEI.

Artikolo 4.

4.3 ... esplorojn pri la instruado forigu la

4.4 ... praktikado por la plibonigo forigu la

4.9 ... publikigaĵojn fariĝu publikaĵojn

Artikolo 6.

6.2 Membroj distingiĝas en fariĝu Distingiĝas.

Artikolo 7.

Sinsekvo de la teksto ŝanĝiĝu jene:

7.1 La Asembleo. sekvas la teksto de 7.1.6.

7.2 La Komitato. sekvas la teksto de 7.2.1. ĝis 7.2.9.

7.3 La Estraro. sekvas la teksto de 7.3.1 ĝis 7.3.7.

7.4 La Sekcioj. sekvas la teksto de 7.4.1. ĝis 7.4.6.

(Tiel ĉi la rubrikaj estas pli bone rekoneblaj kaj retroveblaj)

7.1.3 ... unu fojon dum tri jaroj ... dum fariĝu ... unu fojon dum tri jaroj ... en

7.1.4 ... Statuto kaj pri la eventuala forigu la.

7.2.2 ... de la estraro, la sekcioj fariĝu de la sekcioj.

7.2.6 La kunsidoj estas alireblaj por fariĝu La kunsidojn rajtas ĉeesti.

7.3.4 ... se en urĝaj aferoj necesas decido fariĝu se urĝaj aferoj necesigas decidon.

7.3.7 ... kunvenas fariĝu kunsidado.

7.4.5 ... antaŭ la unuan de fariĝu antaŭ la unua de.

Artikolo 8.

8.1 ... *de la Estaro, la Komitato fariĝu de la Komitato.*

Artikolo 12.

12.2 ... *largskalane fariĝu largskale.*

12.3 ... *ILEI-publikigaĵojn fariĝu ILEI-publikaĵoj.*

Artikolo 13.

13.5 *Aliaj publikaĵoj fariĝu Aliaj publikaĵoj.*

Artikolo 14.

legu: *Eksmembriĝo okazas:*

14.7 ... *ĉe la prezidanto de la Komitato fariĝu ĉe la prezidanto.*

La prezidanto pritraktos la leteron en la venonta fariĝu La prezidanto prezentas la leteron en la plej proksima.

Forigu «Ĝenerala regularo» antaŭ Artikolo 15.

Artikolo 15 apartenas al la Statuto)

Ĝenerala regularo.

Artikolo 2.

2.2 ...*antaŭ la unuan de fariĝu antaŭ la unua de .*

Ŝanĝu la sinsekvon de la eroj tiel ke 2.3 fariĝu 2.1; 2.1 fariĝu 2.2; kaj 2.2 fariĝu 2.3.

Artikolo 3.

3.4 ... *de la Komitato, la Estraro, Sekcio fariĝu de la Komitato, de la Estraro, de Sekcio.*

Artikolo 4.

4.3 ... *taskon kaj labortempon fariĝu taskon kaj tempodaŭron.*

4.4 legu: *En kazo de voĉegaleco la Komitato denove voĉdonas. En kazo de dua voĉegaleco la koncerna afero estas ne-akceptita.* Tiu ĉi ero, 4.4, transiru al la Statuto; ĝi havu lokon en la rubriko «La Komitato» sub numero 7.2.9. Ĉi estas logika sekvo de 7.2.8. Neniel ĝi rilatas al Artikolo 4 de la ĝenerala regularo.

Artikolo 5.

5.1 ... *reelektitaj unu fojon dum tri jaroj fariĝu reelektitaj por tempodaŭro de tri jaroj.*

5.2 *La balotado fariĝu La elekto.*

5.3 *La balotado okazas per skriba aŭ parola voĉdono fariĝu La elekto okazas per baloto aŭ alia voĉdono.*

5.4 ... *la komitatanoj kaj minimume kvin asembleanoj fariĝu la komitatanoj kaj grupo de minimume kvin asembleanoj.*

5.5 ... *la prezidanto respondecas pri daŭrigo de la laboro fariĝu pri daŭrigo de ties laboro respondecas la prezidanto.* Aldonu: *En kazo de ekziĝo de la prezidanto, la vicprezidanto respondecas.*

Artikolo 6.

6.4 ... *al la estraro kaj redaktoro de IPR fariĝu al la estraro kaj al la redaktoro de IPR.*

6.7 ... *La enketa dato estas la unuan de fariĝu la unua. — ... sendita antaŭ la unuan de fariĝu la unua de .*

6.8 Legu: *La S.E. sendu antaŭ la unua de junio, al la ĝenerala sekretario, laborraporton pri la pasinta jaro.*

Artikolo 7.

7.1 ... [tabelo] *ekde 5 membroj fariĝu 5 membroj.*

7.2 ... *kotizo por antaŭua jaro fariĝu kotizo por la antaŭa jaro.*

7.4 ... *de la Statuto, la Ĝenerala Regularo fariĝu de la Statuto kaj de la Ĝenerala Regularo.*

Amendo de la Sveda sekcio de ILEI.

Laŭ decido de la jarkunveno la 17an de majo 1980 en Hallsberg. El la protokolo: *La jarkunveno unuanime decidis, forte rekomendi al ILEI, ke ĝi en sia Statuto ne havu preskribon pri Asembleo. Anstataŭe oni donu al la Komitato la plej altan decidpovon de ILEI. Tiel oni faras la laboron pli simpla kaj efika.*

Subskribis: *Ingrid Otterson, protokolinto; Olle Olsson, Runa Stridde.*

Anstataŭ recenzi...

Mi renkontiĝis kun Carmel Mallia sur Malto, la mirinda perlo de la Mediteraneo. ILEI okazigis sian 14an konferencon kaj nia samideano kune kun siaj grupanoj perfekte organizis ĝin.

Kiam ni sidis ĉetabele por preparoli la iradon de nia konferenco li vekis tuj mian intereson kaj simpatian. El liaj okuloj elradiis ioma melankolio grundita de amara trajto de la animo.

Ĉi tiu viro konis la turmentojn de la vivo — kaj certe li serĉas la vojon al ekstere per poemaj vortoj — li estas poeto kaj amas Esperanton.

Li jam skribis en malta kaj franca lingvoj kaj en ŝatinda arto esperantlingve. Li donacas al mi sian verketon «kontrastoj»

Mi trafolumas — unu «kontrasto» katenas min:

La virino

Mirindaĵo de l' homaro la virino!
Ŝia per la bel' inklino
sian belon denudigas:
sur vizaĝ, emajloj
farmaciaj;
sur ungoj, ruĝnajloj
ho ve! revoluciaj!

Li prezentis poemajn siajn al ni la konferencanoj kaj impresis nin — kial devas nur eldoni siajn verketojn la aŭtoro mem?

Li sendis al mi alian volumeton kaj nomas ĝin: «Kapricaj raketoj, Malto, 1981».

Li skribis enkondukajn vortojn: "Mi nomas ĉi tiun poemaron «Kapricaj raketoj», ĉar mi verkis la ĉi tie entenatajn poemojn laŭ kaprico de mia momenta sento. Ilin mi prezentas laŭ la ordo en kiu mi ilin verkis... Ĝenerale la poemetoj estas gutoj verŝitaj al mia pens- kaj korputo dum aŭ post persona vivosperto. Post mia unua jam publikigita poemaro: «Kontrastoj», ĉi tiu povas aspekti kiel strangaĵo. Ĝi eble similas al alia flanko de mia karaktero".

Jen 'guto':

Antaŭ mi galopas
la literoj sur la skribmaŝino.
Mi la breĉojn de l' papero ŝtopas
per fingrinklino
(17.6.76)

Sub 90 li diras:

Malantaŭ la mondkulisa ĵaluzio
bolas de la homaro la destino
Kiu nevidate rikanas?
Satan' aŭ Dio?

Mi sentas kalvarian vojon kiu sin esprimas en la lasta la 92-a — sendube jen vokas homo, kiu intence verkas en Esperanto, supozante atingi inter ni la homojn unuigantajn per unu unika lingvo — sed li jam estis plurfoje distingita per poeziaj premioj por aliaj verketoj kreitaj de li — perloj kiel la perlo Malto meze en la Mediteraneo.

La prezo de «Kapricaj raketoj» estas po 6 ned.gld. aŭ egalvaloro. Aĉetebla de C. Mallia: 89, Sanctuary Street, Zabbar, Malto.

Didaktikaj ludoj

de Far. Pdensky, Ĉeĥoslovakio

Tiujare mi sukcese uzis dum instruado de Esperanto en Somera Esperanto Tendaro «SET» en Lančov, Ĉeĥoslovakio, didaktikajn ludojn. Mi havis kun ili jam iomete da spertoj, ĉar mi aplikis ilin dum instruado en nia klubo. La didaktikaj ludoj estas tre valora rimedo por aktivigi lernantojn. Per ili akiras ili lertecon en praktika uzado de la lingvo. La ludoj okazigas naturajn parolsituaciojn, kiuj ekinteresas ankaŭ sinĝenemajn lernantojn. La ludoj alproksimigas lernantojn al amika kolektivo.

Per la lingvaj ludoj la instruanto povas ekzercadi la lernantojn je unuopaj vortoj, ŝanĝi kaj formi frazojn, laŭĉene disvolvi frazojn, ekzerci al konversacio, memstara rakontado, ktp. La ludoj estas parolaj aŭ skribaj. Al la skribaj apartenas enigmoj kaj krucenigmoj.

Laŭ niaj spertoj mi klasifikas la didaktikajn ludojn en kvar grupojn:

1. La ludoj por ekzercado laŭ unuopaj vortoj,
2. la ludoj por memstara eltrovo de frazoj,
3. la konversaciaj ludoj,
4. la ludoj por kontinua rakontado.

En la Tendaro mi estis gvidanta la internacian konversacian kurson. Mia grupo konsistis el 5 ĉeĥoj, 3 bulgaroj, 3 germanoj kaj 4 hungaroj. Kvankam mi ĉiam strebis, ke ĉiu instruhoro estu aktiviga ĝojiga kaj amika, tamen portis ĉiu ian spuron de lernepedanteco. Nur didaktikaj ludoj kaŭzis dum instruado tumultan vivon kaj klopodon por venki konkurence. Ili fariĝis por mia instruado valora stimula forto.

Por ilustrado mi volas ĉi tie priskribi almenaŭ unu ludon el ĉiu grupo.

Ludo por ekzercado laŭ unuopaj vortoj: «Vortĉeno»

La lernantoj vicigas vortojn tiel, ke ĉiu nova vorto komenciĝas per lasta silabo de antaŭa vorto.

Ekzemple: arbo — bopatro — roko — kolekti — tipografo — fono — ktp.

Ludo por memstara eltrovo de frazoj: «Tri frazoj»

Eldonita vorto la lernantoj formas tri frazojn, kiuj interrilatas.

Ekzemple: hundo.

Mi havas hejme hundon. Mi promenas kun mia hundo ĉiutage. Mia hundo estas bela kaj obeema.

Konversacia ludo: «Kaŝita vorto».

Unu lernanto foriru kaj la aliaj interkonsentu pri iu vorto. La vokita lernanto devas per demandoj diveni la interkonsentitan vorton. Procedo de la ludo estu tiel, ke ĉiu respondo enhavu la interkonsentitan vorton. Kiu la vorton per sia respondo malkaŝas, tiu denove foriros kaj la ludo daŭrigas.

Ekzemple: Interkonsentita vorto: «bela»

demando: Kia tago estas hodiaŭ?

respondo: Hodiaŭ estas *bela* lundo.

demando: Kion vi faros posttagmeze?

respondo: Se estos *bela* vetero, mi banos min.

ktp.

Ludo por kontinua rakontado: «Komponita rakonto»

Instruisto difinos temon kaj lernantoj iom post iom evoluas tutan lingvaĵon tiel, ke ĉiu el ili diros unu frazon.

Ekzemple: Somera Esperanto-Tendaro.

1-a lernanto: Nia somera Esperanto Tendaro situas en tre bela regiono.

2-a lernanto: Ĝi estas meze de profunda arbaro apud grandega lago.

3-a lernanto: Ni loĝas en tendoj kaj kabanoj.

4-a lernanto: Antaŭtagmeze ni lernas Esperanton kaj posttagmeze ni havas liberan tempon.

ktp.

Dum mia instruadopraktiko de Esperanto mi estas kolektinta 30 didaktikajn ludojn, kiujn mi sukcese aplikis.

IPR informas pri la 16a konferenco de ILEI

Kelkfoje mi legas en leteroj de niaj membroj: “Kial la konferenco ne okazu tie antaŭaŭ tie?” Aŭ “Kial ne tiam anstataŭ tiam?”

Jam delonge prezidanto kaj ĝenerala sekretario deziras konferenci ekster Eŭropo ĉar niaj internaciaj taskoj pretendas tion. Sed la realigo de ekster-europaj konferencoj dependas de cirkonstancoj, kiujn ni ne povas influ:

— jam 1978 flugis aviadile d-ro Dazzini kaj mi al Malagasio, helpis fondi novan sekcion, estis akceptitaj far de la ministroprezidanto, jam vizitis la konferencan hotelon, interkonsentis pri la dato, ricevis akcepteblan oferton de la ŝtata flugkompanio kaj poste ni ricevis registaran leteron, per kiu ni estis informita, ke la registaro refuzis nian konferencon,

— ĉi-jare ni intencis esti en Brazilo. Longjara kaj pli da klopodado trovi organizantojn ne kondukis al dezirita sukceso,

— konferenci ie en Aŭstralio por kunvenigi gekolegajn Esperantistojn el la pacifika spaco eble realiĝos dum kristnaska tempo 1983/84 aŭ 84/85,

— sed nur konferenci en norda parto de Eŭropo (Norvegio, Svedio aŭ Finnlando) havas ĝiajn problemojn: neniu emas organizi,

— volonte ni estus 1982 en Alicante (Hispanujo), sed similaj kaŭzoj...

Ĉiam preta por helpi kaj labori estas nia itala sekcio: Nia 16a konferenco okazos en Seiano (Napoli) di Viĉo Equense — Italio, 1982.07.15-24a. Jen la kialo de la tempo: kunlabore kun UEA, ILEI ĉiam ebligas al ĉiuj partopreni la UEA-kongreson (1982.07.24-31a en Antverpeno); tamen estas malglataĵo (la 24a de julio) sed devigas nin la meza feria ordo.

La konferencanoj loĝos kaj laboros en Moon Valley Hotelo, apud la marbordo vide-al-vide de Vezuvio distance 38 km-ojn. Aliaj distancoj: Monte Faito km 14, Sorrento 7, Pompei 17, Capri 8, Ischia 28...

Ĉiuj, kiuj regule vizitas niajn konferencojn konas ilian bonan nivelon, iliajn amikajn renkontiĝojn kaj internacian etoson. La ripozigaj aspektoj aŭ kulturaj ekskursoj estas nomindaj:

1. Preskaŭ ĉiutagaj veturoj al la marbordo por bani sin,

Carlo Goldoni LA GASTEJSTRINO Tradukis Carlo Minnaja


“La Gastejstrino” (*La Locandiera*, 1752) estas ĉe Goldoni la verto de la rekonstruo de la virino kiel vera mastrino de sia vivo kaj de la vivo de la aliaj. Temas pri apologio de la uzado de la propra inteligenteco, ĉarmo, ruzeco por atingi la nuran situacion eblan por pluvivi individue: la renverson de la sociaj tavoloj pere de la personaj kvalitoj, kiuj surtretas la stabiliĝintan hierarkion. “La Gastejstrino” certe estas inter la plej bonaj verkoj de Goldoni: la komedio estas kohera kaj solide konstruita laŭ la intrigo, kaj la personeco de la ĉefrola pri-lumas, anstataŭ malheligi, la ĉirkaŭajn karakterojn.

160 paĝoj, 21 cm., 18 gld.

EDISTUDIO, cp 213, I-56100 Pisa.

33,3% rabato por mendoj de minimume 3 ekz-oj

CARLO GOLDONI LA GASTEJSTRINO Tradukis Carlo Minnaja



2. duontaga ekskurso al Pompei,
3. duontaga ekskurso al Ercolano
4. vizito al lernejo «Arta instituto por la prilaboro de la koralo»
5. tuttaga ekskurso al la insulo Capri.

Kaj la temo de la konferenco: «*La emancipa principo de Esperanto en la edukado: eblecoj kaj limoj*»

Invito al la asembleo de ILEI 1982-07-22/23 je la 9aj horoj.

Rajtos partopreni la asembleon kaj voĉdoni ĉiuj sekcioj, kiuj laŭstatute pagis siajn kotizojn sub mencio de la nombro de la anoj de la LANDA SEKCIO!

Paragrafo 8 preskribas: La asembleo de la Ligo konsistas el la deligitoj de la landaj asocioj de la Ligo elektitaj dum ilias ĉefkunvenoj laŭ jena ŝlosilo:

ĝis 30 membroj unu delegito

ĝis 60 membroj du deligitoj

ĝis 90 membroj tri deligitoj, ktp.

Tagordo

TOP 1 Raporto de la prezidanto de la komitato-diskuto kaj senŝarĝiĝo,

TOP 2 Aprobo de la nova statuto

TOP 3 Elekte de la nova estraro: laborperiodo 1982-1984

a) prezidanto: reelektebla

b) vicprezidanto: reelektebla

c) sekretario ĝenerala: reelektebla

ĉ) vicsekretario: sen informo

d) kasisto: vakanta

TOP 4 Decido pri la laborprogramo por trijara periodo

TOP 5 Demandoj, proponoj, diversajtoj

Proceduro:

Ĝis la unua de Majo 1982:

— sendu la sekcioj la nomojn de la deligitoj al la ĝenerala sekretario, anstataŭantoj prezentu sin komence de la asembleo per rajtiga skribo de la sekcio,

— la pagita membrokotizo por la finiĝinta kalendara jaro estos pruvenda per banka kaj samvalida kvitanco (nomo kaj nombro al la ĝ.s.)

— bezonos la prezidanto por la raporto antaŭ la asembleo vian tri jaran sekciostran raporton: sekcioj formas la komitaton,

— bezonas la vicprezidanto la lernejan statistikon!

— bezonas la prezidanto viajn proponojn!

H. Sonnabend

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo:	Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.
Aŭstrujo:	Ernst Rixner Kleingasse 6, 18/8/13, A-1030 Vieno.
Belgujo:	E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal. E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout. M. Sondervorst, Rue du téléphone 1, B-2180 Mettel. H. Lentzen, Feldweg 20, B-4701 Kettenes. Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.
Brazilo:	Hilary Chapman, 7 Fairacre road, Barwell, Leicester LE 9 8HH.
Britujo:	Hristo Gorov, B.E.A., Hristo Botev 97, Sofio Centro.
Bulgarujo:	Lis Thune, Brembarvænget 15, DK-2650 Hvidovre.
Danujo:	Pentti Jarvinen. Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Finnujo:	Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
Francujo:	F R Germanujo: Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-315 Peine.
F R Germanujo:	K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506).
Grekujo:	Francisko Zaragoza Ruiz, Coll. Nacional, Callosa de Segura, Alicante.
Hispanujo:	Zsuzsa Barcsay, Ben Kp. 25/b, H-1011 Budapest.
Hungarujo:	M. Saghafian, Siras Ave, Emdadi str. 22, Vanak, Teheran 19.
Irano:	Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170 Reykjavik.
Irlando:	Reuven Alberg, str. Kraus 12, Tel-Aviv, Ramat Aviv.
Israelo:	Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa, pĉk 11244548.
Italujo:	Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
Japanujo:	Miodgrad Stojanović, Duruntorska ul. 2. IV. 32, YU-11000 Beograd.
Jugoslavujo:	Kolombujo: Manuel Angel M., Apartado Aéreo 60179, Medellin.
Kolombujo:	Luksemburgo: Robert Hoenerger, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette.
Luksemburgo:	Malto: Anthony Mercieca, 20 Valletta Road, Qormi, Malta.
Malto:	Nederlando: D. Luesken-Burger, Boerhavestraat 82, NL-7316 LH Apeldoorn.
Nederlando:	Nordameriko: John Lewine, West Stockbridge, MA 01266, Usono.
Nordameriko:	Norvegujo: Elling Strand, Ekebergveien 208, Leilighet 154, Oslo 11.
Norvegujo:	Nov-Zelando: Gvenda Sutton, 1 Wood street, Upper Hutt.
Nov-Zelando:	Polujo: Stefania Pakalska, Marszalkowska 53, m. 50, PL-00-676 Warszawa.
Polujo:	Sanmarino: Marina Michelotti, via 25 marzo, 73, I-43031 Repubblica di San Marino.
Sanmarino:	Sovetujo: Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV.
Sovetujo:	Nikolaj Starodubcev, Poštrestante SU-340047 Doneck.
Sud-Afriko:	Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1710 Florida Glen.
Svedujo:	Olle Olsson, Bantorget 3, S-22229 Lund.
Svisujo:	Jean Jacques Lavanchy, Traménaz 21, CH-1814 La Tour de Peilz.
Venezuelo:	Esteban E. Mosonyi, Apartado 61500, Chacao, Caracas.

Izolitaj Membroj

Ĉeĥoslovakujo:	Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřimezdice Okr. Píbram.
Ĉinujo:	Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Germana D R:	Till Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brühl.
Jemena PDR:	Jozefo Megyeri, Al-Gomhouriyeh hospital, Khormaksar, Aden.
Kubo:	Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Malagasujo:	Eugene Raveloson, B.P. 127, Antananarivo.
Singapuro:	Hongi Liao, apt blk. 14,2809 H, Eunoo Crescent, Singapuro 14.
Zairujo:	Antoine-Samuel Nkangu, B P 13, Lukala, Nkandu.

Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150 Peine, F R Germanujo.
Vicprezidanto: direktoro Johano Inguzs, Liget út 40, H-1102. Budapest X, Hungarujo.
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa. Italujo.
Vicsekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.
Financoj: Olle Olsson, Bantorget 2, S-22229 Lund. Svedujo.

Kunlaborantaj Organizoj

EEC Eŭropa Esperanto-Centro, Arsenalstraat 5, B-2000 Antwerpen.
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:
S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussell.
FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 42 Grande Rue, F-92310 Sevres.
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.
UEA Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoj, F-75007 Paris.
Konstanta Reprezanto de ILEI ĉe Unesko:
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj — ILEI
en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Elmut Sonnabend, In den Horstwiesen 42, D-3150, FRG

poŝtĝirkonto: Stockholm, 682-117-7 ILEI, Bantorget 3, S-22229 Lund, Svedujo

jarabono: 30 svedaj kronoj

Instruisto, kiu abonas la revuon, fariĝas membro de ILEI.

Familianoj kaj simpatiantoj pagas la duonon, 15 svedajn kronojn, ne ricevas la revuon sed iĝas membroj de ILEI en la koncernaj kategorioj.

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI aŭ al la supre indikita poŝtĝirkonto.